

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

SALUTO AL POETO

(Al Karolo Píĉ)

Vivas viro
kies koro
al beleco emas
kaj poemas
sentojn verŝas,
rimojn versas
kaj amemo
ne estas ĉe li en anatemo.

Je mi dozas mian guton
kaj sondas al li saluton
Lia verko
kresku kiel kverko.
Lia tago,
ĉu sur tero, ĉu sur (Mácha)-lago
estas por li ovo,
kiu sen kovo
de kokino
gvidas ne al kokido, sed al Georgino,
(ĉu al vera,
ĉu nure poet-himera
post vino?)
Ŝi ne fariĝu orfino,
por ke ne ploru ŝia kor' sentema,
ĉar poeto eble restus sen tema!
Li ja devas veni al or-fino!

(Rimaĵo nura de Adolf Staňura)

KAJ KIO NUN?

En lasta tempo venas pli kaj pli ĝojigaj sciigoj pri Esperanto. La sukcesa triumfo ĉe Unesko, ĝia reviviĝo en Sovetio, prove ĝi estas instruata en diversaj lernejoj en multaj landoj. Ĉiam pli kaj pli uzas ĝin diversaj radiostacioj, ankaŭ en filmon ĝi penetras kaj laŭ lasta sciigo ĝi estis jam uzita unuafoje kiel diplomata lingvo inter Sovetio kaj Japanujo.

Kaj kio nun? Ĉu ni estas sufiĉe preparitaj por eventuala venko, kiun ni ĉiuj sopiras, pri kiu ni ĉiuj laboras? Ĉu ni estas sufiĉe spertaj ankaŭ en praktika laboro ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto?

Ni devas esti realaj, ĉar reale ni devas ankaŭ vivi. Dum miaj societa, asocia, kursa kaj radia laboroj mi multon spertis. Pli multaj inter ni restas nur entuziasmuloj, ne praktikuloj. Multaj estas eĉ tiaj, kiuj pro entuziasmo al nia lingvo ĝin eĉ ne profunde lernas por ili sufiĉas nur admiri ĝin kaj propagandi. Kaj ofte tia propagando eĉ malutilas. Oni ofte rigardas nin stranguloj.

Venas rapide la momento, kiam oni demandas nin: "Ĉu vi estas kapablaj plenumi la devojn, kiuj ekestas per oficiala enkonduko de Esperanto kiel lingvo internacia?"

NI DEVAS ESTI PREPARITAJ! Ankaŭ nunjare okazos Somera Kolegio de Esperanto en Doksy. Ĝi okazos de 15. ĝis 29. VII. 1956. Detalaj informoj estos publikigitaj. Jam nun pripensu vian libertempon! Estos por vi ĝuo uzi libertempon en Doksy, en alloga regiono kun granda lago kaj samtempe tie perfektigi en via lingvoscio.

Ant. Slanina

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

BULTENO 36 - 1956

Ni estu preparitaj!

Ricevinte antaŭ kelkaj tagoj la revuon "Esperanto" mi tie legis kun intereso, la artikolon de I. L. "La danĝeroj de sukcesoj", el kiu sonas la samaj zorgoj kiel en mia artikolo "Kaj kio nun?" en la lasta V. V. La samajn zorgojn havis komitatanoj de Somera Kolegio de Esperanto en Doksy dum sia kuveno en Praha, kie ili traktis pri nunjara aranĝo de SKED. Al tiuj, kiuj ne legis supre nomitajn artikolojn, mi devas klarigi la zorgojn, kiujn havas la konsciaj kaj eĉ respondecaj esperantistoj. En la lasta tempo dank' al UEA, Esperanto rikoltas sukcesojn. Kaj sonas paradokse, la sukceso estas danĝera, jes danĝera tiam, se ĝi trovas homon nepreparita. Pasis jam idilia tempo, kiam oni en kluboj kulturis Esperanton pro Esperanto. Venas la tempo, kiam Esperanto komencas serioze ludi la rolon de "helpa lingvo internacia" kun ĉiuj praktikaj aspektoj. Ĝi ja estis por tiu celo kreita! Mi denove ripetas: ni devas esti praktikaj. Ni devas esti preparitaj por rikolti, kion ni kun granda laboro kaj oferemo semis. Venas la tempo, kiam la scipovo de Esperanto alportos ankaŭ la monan profiton al tiuj, kiuj ĝin lernis. Povas okazi, ke ĝi subite estos enkondukita en lernejojn, en grandajn entreprenojn ktp. La komitato de SKED pritraktis ĉiujn eventualaĵojn kaj decidis pri nova organizo de siaj kursoj. Estos aranĝita speciala kurso por E-instruistoj profesiaj kaj tiuj, kiuj volas fariĝi E-instruistoj. En tiu ĉi kurso estos ĉiuj preparataj por eventualaj ŝtataj ekzamenoj.

Estas necese gajni novajn adeptojn de Esperanto. Tiucele ĉiu esperantisto propagandu inter neesperantistoj la partoprenon en kursoj por komencantoj en la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy. Tie ili ricevos lecionojn de E. laŭ gaja Ĉe-metodo. Speciale turnu vian atenton al instruistoj – fakuloj. Tiuj estos plej bezonataj, kiam venos decidiga tempo.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri Ĉe-metodo, havas okazon ĝin tie studi. Kompreneble estos aranĝataj ankaŭ konversacia kaj progresiga kursoj. Ankaŭ lecionoj pri oratora arto ne mankos. Tie dum diversaj diskutoj pri diversaj temoj (nur en Esperanto) oni plej bone lernas elokventecon, rapidan pensadon rekte en la lingvo. En kursoj instruos fakuloj sub gvidado de konata pioniro kaj Akademiano Dro Aug. Pitlík.

Aranĝu vian libertempon tiel, ke vi povu partopreni Someran Kolegion de Esperanto en Doksy de 15.VII. - 29.VII.1956. Ne preterpasu unikan okazon! (Adreso por informoj kaj aliĝoj: Somera Kolegio de Esperanto, D o k s y u Máchova jezera).

Ant. Slanina

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

FLORAJ LUDOJ

En Doksy okazos - jam la sepan fojon - landa belarta konkurso "Floraj Ludoj".

La ideo de Fl. L. devenas el la kutimo de la kataluna nacio, kiu ĉiujare aranĝas konkurson, ĉe kiu oni premias originalajn poemojn, prikantantajn la acion al la patrujo, al la virino kaj al la homo. La premiitoj ricevas florojn kaj librojn. Elektitaj poemoj fariĝas poste naciaj kantoj, kiuj rapide disvastiĝas tra la tuta lando, pliriĉigante la nacian kulturon.

Okaze de la V-a Universala Kongreso de Esperanto 1909 en kataluna ĉef-urbo Barcelona esperantigis la prepara komitato ĉi-kutimon por pliriĉigi la kongresan programon.

Oni aranĝis "Internaciajn Florajn Ludojn", kiujn partoprenis per la originalaj poeziaĵoj samideanoj de la tuta mondo. Unua esperanta poetino Mario Hankel el Dresdeno, prezidantino de la Esperantista Literatura Asocio, elektita "reĝino" de la I. F. L. , transdonis al la diverslandaj laŭreatoj premiojn florajn kaj librajn. La impresa kataluna kongresa okazintaĵo estis poste dum multaj jaroj forgesata! - -

Nur en la j. 1948 Somera Kolegio de Esperanto en Doksy revivigis la "Florajn Ludojn". Ses belartajn konkursojn (1948-52 kaj 1954) partoprenis 28 aŭtoroj per 78 kontribuaĵoj (poemoj, prozaĵoj, tradukaĵoj kaj komponaĵoj). . La laŭreatoj ricevis diplomojn, florojn kaj monpremiojn.

La VII-aj Floraj Ludoj okazos dum la ĉi-jara kursaro de la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy je temoj: "Somera Kolegio de Esperanto en Doksy", "Mácha-lago", "Societa esperantista vivo en Doksy". Pluraj informoj sekvas en la venonta Verda Voĉo. Partopreni la konkurson (originalaj poemoj kaj prozaĵoj) rajtas ĉiuj koleianoj estintaj kaj nunaj gekursanoj kaj kursaj instruistoj.

Jen, gesamideanoj, penu iĝi "floraj ludantoj" !

Pi

UTILIGU LA ALMETITAN ALIĜPROSPEKTON. ALIĜU AŬ ALIGU VIAJN GEKONATULOJN!

NOVAĴOJ EL DOKSY:

KURSO POR INFANOJ 6-10 jaraj okazos, se aliĝos sufiĉa nombro de infanoj.
En nea kazo oni la aliĝintajn aligos en la kurson por komencantoj.

VARTEJO por infanoj de la 5-a ĝis la 6-a jaro estas projektata. Kotizo por infano estas 20 Kčs.

GRAVA ADRESO (por aliĝoj kaj informoj); Letní Kolej Esperanta v Doksech u Máchova jezera.
Moskevská 453. -

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO
